



PILO-PRESS

Internacia

Informservo

Libro de la Semajno

Trigroŝa Romano

de

Bertolt Brecht

Prezo 32,-- GM

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pichel

Postfach 2113

D-85 Nürnberg

Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 1/78 - 6 jan 1978

Aperas ĉiusemajne

Novjara mesaĝo de la Prezidanto de UEA

Rotterdam (uea/pp) - La Prezidanto de UEA, Humphrey Tonkin, publikigis jenan novjaran mesaĝon 1978:

"La plej bona karakterizo de la celoj de la Esperanto-movado venis en 1977 ne de parolanto de la Internacia Lingvo sed de eksterulo: 'Estas samtempe....respekto al la kulturaj diversecoj kaj...deziro je internacia alproksimiĝo, kiuj motivas vin.' Per tiuj vortoj la koncerna parolanto ĝuste komprenigis, ke la Internacia Lingvo kapablus samtempe ŝirmi la kulturojn kontraŭ la atencoj de la grandaj lingvoj kaj ebligi rektan komunikadon inter diverslingvanoj. Ĝi do samtempe apartigus (por konservi la kulturajn valorojn) kaj kunigus (por akceli la senprezajn kontaktojn).

La parolanto estis s-ro Amadou-Mahtar M'Bow, Ĝenerala Direktoro de UNESKO. La okazo de lia parolado estis la Universala Kongreso de Esperanto. Neniam antaŭe tiel eminenta funkciulo de internacia organizaĵo gastis en unu el niaj internaciaj kongresoj.

Tiujn vortojn aŭdis kaj eĥis alia ĉeestanto en la inaŭguro de nia kongreso, la islanda ŝtatprezidanto, s-ro Kristján Eldjárn. Nur malofte en la pasinteco partoprenis nian kongreson ŝtatprezidanto. Preskaŭ samtempe, en alia mondoparto, alia ŝtatprezidanto esprimis sin pri Esperanto. En mesaĝo al la usona nacia Esperanto-kongreso, Prezidento Jimmy Carter skribis: "Plibonigita komunikado inter individuoj kaj nacioj estas unu el la ĉefaj metodoj por konstrui pli grandan internacian interkomprenon kaj bonvolon. Mi laŭdas viajn klopodojn kontribui al tiu celo." La usona ŝtatprezidanto ne estis la sola nova favoranto de nia laboro: la revuo Soveta Unio aperigis, kelkajn monatojn antaŭe, longan favoran intervjuon pri Esperanto. Radio Vatikano komencis utiligi Esperanton. En Irano, senprecedente multaj civitanoj ekfrekventis Esperanto-kursojn.

La nunaj estas eksterordinaraj tagoj por Esperanto. Entute, la jaro de la naŭdeka datreveno de Esperanto estis eksterordinara jaro.

Sed ni ne perdu nian ekvilibron. Okazis iom similaj sukcesoj en pasinteco. Pensu nur pri la periodo 1923 -24. Senprecedente granda Universala Kongreso, favora rezolucio de la Franca Akademio de Sciencoj, granda komerca konferenco pri Esperanto, debatoj en la Ligo de Nacioj...Ĉio ĉi konvinkis multajn homojn, ke la venko jam alproksimiĝas, ke nur necesas atendi ĝin. Pensu nur pri 1954, kiam UNESKO, sub lerta premo de profesoro Lapenna kaj liaj helpantoj, rezoluciis rekone al la kontribuo de Esperanto al la proksimiĝo de la popoloj de la mondo.

Ni povas demandi nin kial je tiuj pli fruaj okazoj la sopirata rapida disvastiĝo de Esperanto ne okazis. Eble la politikaj kondiĉoj ne estis maturaj, eble niaj organizaĵoj ne estis sufiĉe fortaj por ekspluati la ŝanĝantajn kondiĉojn, eble mankis unueco inter la laborantoj, aŭ mankis la volo fine kaj definitive antaŭenigi la aferon.

Nun denove ni staras ĉe tiu jam vizitita sojlo. Antaŭe ni ne sukcesis transpaŝi ĝin, retroirante denove, perdinte fidon, konfuziĝinte pri la vojo, laciĝinte.

Ĉi-foje ni ne permasu retroiron. Jen ŝtatestroj subtenas nin: ni uzu tiun subtenon por turni aliajn niadirekten. Jen ekzistas bona volo

en internaciaj organizaĵoj: ni utiligu ĝin. Jen ordinaraj popolanoj lernas la Internacian Lingvon: ni semu similajn semojn en aliaj eble fekundaj landoj. Necesas ĝeneraligi niajn jamajn atingojn, internaciigi la sukcesojn en la unuopaj landoj, kaj konstrui novajn sukcesojn sur la jam atingitajn.

Kaj kiel ni sukcesu, se la optimistoj de 1924 malvenkis? Ĉar ni posedas multajn avantaĝojn, kiujn ne posedis niaj antaŭuloj. Unue, ni laboras por matura lingvo - pruveble pli fleksebla kaj pli profunda ol tiu de 1924. Due, ni laboras per fleksebla kaj unueca Asocio. Tria, tiu Asocio estas finance kaj administre solida, dank' al la ŝparoj kaj plifortiĝoj de la pasintaj tri jaroj. Kvare, kaj ĉefe, ni laboras en mondo, kiu, kvankam ankoraŭ longe for de tiaj atingoj, tamen komencas kompreni la valoron (aŭ, pli precze, la neceson) de harmonia kunvivado en spirito de reciproka komprenemo. Unu el la necesaj kondiĉoj de tiu komprenemo estas, aŭ devas esti, taŭgaj lingvaj rimedoj. Naciaj lingvoj eble povas helpi, sed nur Esperanto povas liveri tiun duoblan garantion, kiun aludis s-ro M'Bow, nome la garantion de kultura diverseco kaj internacia kompreniĝo.

Ni posedas la rimedojn. La kondiĉoj estas maturaj. Do, la vojo estas malferma kaj la sojlo trapasebla. Ĉu ni kuraĝe antaŭeniros aŭ time hezitemos? Ĉi-foje ni ne hezitu. Ni prenu per ambaŭ manoj la defion de 1978. La vojon al la ĝenerala utiligo de Esperanto ni firme kaj definitive malfermu.

Sukceson al ĉiu nia membro, al ĉiu laboranto por la Internacia Lingvo, en la jaro 1978!

Humphrey Tonkin
Zamenhof-Tago, 1977

Nova movado rapide kreskas en Irano

Rotterdam (pp) - Dum la pasintaj 12 monatoj, nova movado rapide progresis en Irano. Antaŭ unu jaro, preskaŭ neniu en tiu lando sciis pri la Internacia Lingvo Esperanto; nun ĝi estas ofta temo en la gazetaro kaj radio. En 1977, ĉ. 2000 studentoj finis Esperantajn kursojn, sole ĉe la Universitato de Tehran, kaj en 10 monatoj vendiĝis 14 000 ekzempleroj de la lernolibro por Farsi-parolantoj, dufoje represita.

Profesoro Amir Arĝomand de Tehran-Universitato sciigis, ke la studentoj devenas el ĉiaj medioj kaj edukaj niveloj, kaj aĝas de 14 ĝis 72 jarojn. Li sendis raporton pri la situacio al la Ĝenerala Direktoro de Unesko, organizaĵo kiu petis ke la ŝtatoj-membroj informu ĝin, se la instruado de Esperanto plivastiĝos.

La Ministrejo de Scienco kaj Supera Edukado interesiĝas pri tiu fenomeno, kaj lastatempe la Vic-Ministro, Profesoro Amuzgar, sendis al kolegioj de literaturo kaj fremdaj lingvoj leteron, en kiu li forte rekomendis, ke Esperanto inkluziviĝu en la instruprogramejo. Simila letero estas sendita al la Kolegio de Aerservoj, ligita al Irana Aerlinio. Iranaj diplomatoj jam ricevas enkondukan kurson en Esperanto, en kadre de sia dum-serva trejnado.

Kial Esperanto tiel forte kaptis la intereson de la irana publiko? Tiun demandon eble respondi la Ministro pri Edukado, kiam li deklaris, ke eĉ post 7-jara studado de la angla lingvo, lernejoj ne scias paroli aŭ skribi unu solan frazon senerare.

La persono, kiu havas la ĉefan meriton pri la rapida akcepto de Esperanto, estas D-ro M.H. Saheb-Zamani, prelegisto pri islama sociologio ĉe Tehran-Universitato. Ekde kiam li konstatis la potencialon de la internacia lingvo antaŭ 2 1/2 jaroj, li batalis, por ke ĝi agnoskiĝu en Irano. En intervjuo, publikigita en la internacia revuo "Esperanto", li klarigis, kial li konsideras la internacian lingvon grava por sia lando. Ĝi ĉefe valoras, laŭ li, kiel facile akirebla komunikilo por

la tria-mondaj popoloj, ebliganta al ili atingi la sciencan kaj teknikan scion kaj la kulturan heredaĵon de la Okcidento, sen antaŭa multjara studado de dua nacia lingvo, kiu plej ofte donas nekontentigajn rezultojn.

En la nuna tempo, li diras, krom la problemoj pri malriĉaj ekonomioj, malaltaj higienaj niveloj ktp., la evolu-landoj devas superi la aldonan malhelpon de lingva baro: malhelpon, kiu multe pli gravas en la Oriento, ol en Eŭropo. D-ro Saheb-Tamani ankaŭ menciis, kiom da tempo oni malŝparigas en iranaj lernejoj pro deviga lernado de fremdaj lingvoj - 6 horojn semajne dum 7 jaroj: sume, kvinono el la lerneja programo kaj el la totala buĝeto de la Ministrejo de Edukado. Pasintan jaron, li asertis, oni elspezis 400 milionojn de usonaj dolaroj por lingva instruado - monon, kiun en evoluanta lando oni povus elspezi laŭ pli utila maniero.

La Kanceliero de Tehran-Universitato, D-ro Motamedi, persone malfermis la unuan ĉi-jaran Esperantan kurson, en ĉeesto de vickancelieroj, dekanoj, profesoroj kaj 300 studentoj. Li esprimis la esperon, ke la disvastiĝo de Esperanto helpas internacian interkomprenadon kaj pacon.

Laŭ Internacia Gazetara Servo de UEA, dec. 1977, n-ro 72

Esperanto kiel internacia helplingvo

Recenzo de Radio Wien-ORF/Regional, ĵaŭde, 78-01-05

La 50-paĝa germanlingva broŝuro "Esperanto kiel internacia helplingvo" eldonita de Ludwig Pickel, Nürnberg, Germanio, estas fotografa represo de la germanlingva tradukita raporto, kiun prezentis la Ĝeneralsekretario kaj akceptis la Tria Plenkunsido de la Ligo de Nacioj en la jaro 1923.

Unuavide oni supozas, ke tiel titolita raporto devas esti io seke oficiala, do, laŭ fortimiga versaĵo, sufiĉe enua. Sed kia surprizo! Post nur malmultaj linioj nia intereso jam estas kaptita de tre vivantece, en agrable flua lingvo prezentata, historie, lingvopraktike, pedagogie kaj en ĝenerala senco eduke orientita valortakso de nia lingvo. Dank' al multaj, precizaj, tamen tute ne monotone tabelecaj detaloj ĝi pruviĝas bona suplemento al la renoma verko de Privat, kiu en aparta ĉapitro ja resumis tiun tekston, transprenante jen kaj jen ankaŭ plurajn liniojn laŭvorte.

La plejparto de la faktoj kaj argumentoj estas nun, post pli ol duonjarcento, ankoraŭ tiel trafa kaj aktuala, ke la broŝuro, sur bona papero klare presita, rekomendiĝas kiel fidinda kleriga propagandilo de unua rango.

Dezirindas, sendube, kompleta Esperanta versio.

Historische Dokumente, Nummer 1, Esperanto als internationale Hilfssprache, Bericht des Generalsekretariats des Völkerbundes, angenommen von der Dritten Vollversammlung des Völkerbundes, 1923, Deutsche Übersetzung, Fotonachdruck 1977, Verlag: Ludwig Pickel, D-8500 Nürnberg 1, Postfach 2113, Prezo 5,20 DM.

Salutojn el Sudameriko

26.12.77

Kara Pilo-Press, koran saluton kaj feliĉan 1978 de la Ekyatoro! Mi ĵus alvenis en Quito, je 3 000 m s.m., sur paralelo 0⁰⁰, post vizito al la Esperanto-organizaĵoj en La Paz, Lima, Santiago, Buenos Aires, Montevideo, Porto Alegre. En ĉiu tiuj urboj la idealo de Esperanto estas viva, sed la izoliteco grandega. Je la fino de la semajno mi ankaŭ konas la samideanaron de Bogotà kaj Caragas.

Daŭrigo de p. 3: Salutojn el Sudameriko

Mi deziras al vi, ke iam vi povas koni la majestecon de la Andoj kun siaj neĝpintoj de 7 mil m. kaj pli!

Kore Ursula Grattapaglia

D-ro Alfred Macher, ORF-Vieno, bondeziras

D-ro Alfred Macher esprimas bondezirojn al ĉiuj aŭskultantoj de siaj semajnaj komentarioj kaj dankas ĝojjigite al tiuj, kiuj spontanee kaj ofte ankaŭ ripete sciigis al ni sian kontenton kaj aprezon.

Denove limeriko

Feliĉan Novjaron en vero
mi sendas al vi kun espero,
vivi en unuiĝo
kaj bona kompreniĝo.
Fariĝas neniam vespero!

La supran limerikon kun novjaraj bondeziroj sendis al ni s-ino R. David, Nürnberg, kiu ĝin verkis sub influo de la libro "Die ältere Dame aus Preetz 333 Limericks" de Richard Schulz. Kiu volas legi la limerikojn en germana lingvo kaj la 16 en Esperanto kaj eventuale mem verki limerikon, metu la libron ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1. Prezo 12,80 DM.

Esperanto en Radio

Sendube, la elsendoj de Radio Varsovio meritis pli da loko en Pilo-Press, speciale la politikaj, ekonomiaj kaj kulturaj komentoj kaj felietonoj. Bedaŭrinde la redakcio de Pola Radio ne sendas interesajn, aktualajn tekstojn, kiuj ebligus rapidajn kopiojn. Nur ORF Vieno kaj Radio Romo sendas regule al ni la manuskriptojn de la elsendoj.

Dum la pasintaj semajnoj, ankaŭ dum la festotagoj, kun intereso ni aŭskultis la Varsoviajn elsendojn. La komentarioj kaj felietonoj sin ofte okupis pri la interna situacio de Pollando. Fakte oni ne prezentas la malfacilaĵojn, kiuj laŭ la redakcio ankaŭ fontas en la konjunktura reĝeso de la okcidento. Sed ĝenerale oni rigardas kun optimismo sur la ekonomian evoluon. Kun optimismo Varsovio ankaŭ rigardas la evoluon de la monda kaj speciale eŭropa politiko, kie ĉefe regas la malstreĉiga tendenco. Tamen oni kredas vidi en la okcidento malstreĉigajn malamikojn. La ĉefan eventon de la nuntempo, la interparolojn inter Begin kaj Sadat, Varsovio negative aprezas, kvankam la stacio ĉefe citas eldirojn de arabaj kontraŭuloj de la paŝo de Sadat. Pozitive Radio Varsovio taksas la renkontigon inter prezidento Carter kaj Gierak. Oni certe ekkonas la specialan rolon de Pollando kadre de la socialismaj landoj. En la konflikto inter Vietnamio kaj Kamboĝo Pollando subtenas Vietnamion.

Radio Zagreb ĉi-foje elsendis post la kutimaj novaĵoj el Jugoslavio humuran radio-artikolon en la traduko de Emilija Lapenna de nuntempa humoristo sub la titolo "Vojaĝpriskribisto". Venontfoje oni aŭdos radio-artikolon pri ĝenerala temo.

Svisa Kurtonda Servo. D-ro A. Baur volas denove repreni sian serion pri la romanĉa lingvo. Ĉerte interesa temo. S-ro Claude Gacond dum la pasintaj semajnoj autobiografie rakontis pri sia esperantistiĝo, dum la lasta elsendo temis pri skiveturado kaj skilernejo en Svislando.

Pekino. Nur malofte en la Pekinaj elsendoj oni aŭdas ion pri Esperanto mem. Des pli surprizaj estis la eldiroj pri artikoloj en "El Popola Ĉino" kaj de ĉina veterano pri Esperanto en unu el la pasintaj elsendoj.

Pilo-Press, internacia informservo. Aperas ĉiusemajne. Jara abonkoto 30.-- GM. Pageblas al Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1, Postĉekkonto Nürnberg 819 56-851.